

Numero: 251.  
Aprilo: 2013.

21-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefono: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbel@t-online.hu](mailto:espbel@t-online.hu)  
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

## Nacieco aŭ sennacieco

Ĉu esperantisto povas esti nacionalisto? Lastatempe min ege interesas ĉi tiu temo. Pri tio mi diskutadis, eĉ disputis kun multaj adaptoj de la zamenhofa lingvo. Ofte mi estis atakita dirante: vera esperantisto forĵetas la naciajn sentojn kaj pensas tuttere.

Komence ankaŭ min katenis tiu ĉi sento kaj revadis pri tia mondo, kie malaperos la nacioj kaj ĉiu popolo apartenos al unu familio. Ili estu blankaj, nigraj, flavaj kaj ili parolu kiun ajn lingvojn, Esperanto kunligos ilin.

Mi ankoraŭ vidas la grandan eblon en Esperanto. Ĝi povos fariĝi komuna lingvo de la homaro. Sed ni ne forgesiĝu pri niaj naciaj valoroj. Fakte en la mondo ĉiam estos kion ni devos solvi sennaciece. Ekzemple la malsateco, malsanoj, ekonomia krizo la minaca monstro de nuklea milito ktp.

Kara Leganto, ĉu vi jam enpensiĝis, kio okazus, se finfine malaperus landoj kaj nacioj? El la terglobo fariĝus giganta unuiĝanta ŝtato, kiun gvidus plenpotenca registaro kaj nur unusola lingvo ekzistus.

Tiu lingvo estus Esperanto. Ĝi estas rozkolora sonĝo en infanĉambro. Tiu ĉi prespektivo ne estus bona ankaŭ por nia ŝatata lingvo. Ĝi naskus hegemonion kaj malgraŭ la fina venko de Esperanto en la koro de multegaj homoj rezultigus malamon.

Esperanto naskiĝis por helpi la komunikadon de diverslingvaj homoj. Mem doktoro Zamenhof manifestis, la kreita lingvo ne deziras fariĝi la konkurantoj de neniun nacia lingvo. Do ankaŭ por Zamenhof estis grava la nacieco, aparteni al iu nacio.

Se vi uzos Esperanton, vi ne devos honti vian naciecon. Aliflanke estu fiera, ĉar paralele en ĉies koro tie kaŝiĝas ankaŭ la sennacieco, ĉar sur nia terglobo estas multaj aferoj, kiujn ni povas fari nur komune mano en la mano.

Laŭ mi, naciismo ne minacas la estonton de Esperanto, ĉar ĝi estas ĉies lingvo.

**-Redaktanto-**



## Eksterlande

Li ankoraŭ neniam estis eksterlande. Tial li tre atendis la tagon de la ekveturo.

Sinjoro Varga jam frumatene vekigis, ĉar ili devis kolektiĝi je la sesa horo antaŭ la preĝejo de la urbo. Ili ĉiuj estis ekscititaj pro la vojaĝo.

La buso alvenis akurate. La ŝoforo estis simpatia, juna viro. Li trankviligis la vojaĝantojn, ke ĉio estos en ordo kaj ili havos eksterordinaran travivaĵon en la vizitota urbo, kien ili vojaĝos. Li jam ŝoforis tien multe da grupoj.

La buso estis komforta. En ĝi estis eĉ televidoekrano kaj dum la vojaĝo kelkaj pasaĝeroj rigardis tedan, usonan filmon.

Anstataŭ rigardi filmon li elektis admiri la pejzaĝon preter kio la buso veturis.

Ili ne vojaĝis longe. La vojaĝcelo estis la urbo de najbara lando. Onidire tie eblas bone butikumi. El la grupo plej multope ili elektis la vojaĝon pro tio. Ili ekiris kun plenŝtopitaj monuoj kaj ilin interesis nur la brilaj vendejoj kaj magazenoj. Kial ilin interesus la tieaj muzeoj aŭ aliaj vidindaĵoj. Rapide elspezi la monon kaj veni hejmen antaŭ ol komenciĝos la ŝatata sapopero-filmo en la televido.

Kiel mi diris, sinjoro Varga ne estis eksterlande. Kvankam jam li pasis sesdekjara. Lin interesis, kiel oni vivas en la najbaro, kie oni parolas malsaman lingvon. En la lernejo li lernis kelkajn fremdajn lingvojn, sed ankoraŭ neniam ekparolis per ili krom la lernohoroj.

La buso ekparkis antaŭ grandmagazeno ekster la urbo. La homoj konkurante unu kun la alia enkuregis la grizan, senkarakteran konstruaĵon, kvazaŭ la lastaj ricevus nenion.

Ene la magazeno estis plenplena de varoj. Ankaŭ sinjoro Varga eniris. Li estis unuafoje eksterlande kaj esperis, ke fine li ekaŭdos paroli la eksterlandanojn.

Li trompiĝis. Ĉie kaj ĉie oni parolis lian gepatran lingvon, eĉ la personaro de la grandmagazeno. Pro la proksimo de la landlimo ĉi tie oni grandparte parolis hungare. Nur kelkfoje li aŭdis fremdan parolon.

Kiam la grupanoj elspezis monon la programo temis pri urborigardado. Sed tio jam neniun interesis. Per buso ili rondiris en la urbo. La fremdulgvidantino parolis ion pri la historio de la urbo. Ŝajne neniun atentis ŝin. La plejmultaj pasaĝeroj ekdormis. Kiam buso subite devis halti pro fervoja barilo iu virino ekkriis en la malantaŭa parto:

-Ĉu ni jam ekiris hejmen?

**-Ŝaŝa-**

## Donu vian manon!

Kiam mi ekkonis lin, li jam estis maljunulo. Super lia kapo forflugis multe da jaroj. Ekde la renkontiĝo jam kelkfoje venis printempo post la frosta vintro.

La oĉjo Pista tiam estis pli ol okdek jara kaj li apenaŭ povis movi pro siaj doloraj piedoj. Li sidis sur benko en parko sub ombra arbo.

Unue mi ne rimarkis lin. Li estis por mi maljunulo el la multaj ripozantaj.

Mi preteriris lin kaj jam mi estis malproksime, kiam li postvokis min.

-Junsinjoro! Vi perdis ion.

Mi returnis min. Sur la vojeton falis el mia sako la foto de mia karulino. Unusola foto, kiun mi ricevis de ŝi ankoraŭ antaŭ monatoj.

Mi estis tre dankema al li. Mi reiris kaj eklevis la bildeton de sur la asfalto kaj balbutis kelke da dankvortoj.

Kiam niaj okuloj renkontiĝis, mi ekvidis strangan, brilan lumon de la okuloj de la maljunulo.

-Junage ankaŭ mi amis junulinon – li diris ridetante.

Mi ne komprenis, kiel li vidas, kio estas sur tiu malgranda foto. Ja ĝi estis malproksime de li. Poste li daŭrigis:

-Ŝi estis bela knabino kun longa, blonda hararo. Neniam mi vidis tiel belegajn, blujn okulojn kiel la ŝiaj. Ŝi nomiĝis Julia, kiel en tiu fama tragedio. Estis arda amo. Almenaŭ mi tiel kredis longe. Ankoraŭ nun mi sentas sur mia buŝo ŝiajn kisegojn. Sed la bela songo en iu tago forflugis. Erupciis milito kaj mi devis iri al batakkampo. Ni longe adiaŭis en la stacidomo. Mi pendis el la fenestro de la vagono atendante la ekiron. Ŝi staris plorante sur la perono kun multaj, aliaj virinoj kaj infanoj. Mi malgaje ridis kaj diris: „Atendu min! Mi revenos.” Malrapide la longa vagonaro ekmovis. Mi malesperiĝis kaj kriis: „Donu vian manon!” – Ŝi ekprovis etendi sian brakon, sed nur niaj fingroj tuŝis iom unu la alian.

La milito estis terura. Onidire mia familio ricevis informon pri mia morto. Fakte mi vundiĝis, sed mi ne mortis. Longe mi estis militkapita. Reveninte hejme post jaroj mi sciiĝis, ke mia karulino edziniĝis kaj ŝi vivas en alia urbo kun sia nova familio. Tiam mi bedaŭris, ke mi ne falis sur la batakkampo. Restis pri ŝi nenio, eĉ unu malgranda foto. Bedaŭrinde! Do, junsinjoro, neniam perdu ĝin, ĉar eble post multaj jaroj ĝi estos la unusola memoro pri ŝi!

Mi diris ion al la maljunulo. Kion, tion mi jam ne memoras kaj mi iris plu sur la parka vojeton. Ankoraŭ nun estas antaŭ miaj okuloj du brakoj, kiuj deziras atingi unu la alian.

-Simon Vadházi-

## Pri imaga vojaĝo

-Fantasta rakonto-

VIII.

Nelonge mi sidadis sur la benko. Post kelkaj minutoj blanka, strangaspekta aŭto alvenis por mi. Ĝi ŝvebis en la aero super la tero kelkajn centimetrojn. Ĝi ne havis radojn, kiel ĉe ni. En ĝi estis neniu, eĉ ankaŭ ŝoforo. Subite en mia cerbo mi aŭdis fremdan voĉon. Unue mi ĉirkaŭrigardis pensante, ke iu vokis min. Mi vidis neniun, kiu povintus alparoli min. Mi ege surpriziĝis. Mi kristaloklare aŭdis, ke oni parolas al mi. Ĉio okazis en mia cerbo.

-Mi estas la grafo Bonfarulo. Bonvolu enaŭtomobiliĝi! Ne timu, ĉio estas en ordo. Ĉi veturilo transportos vin al mia hejmo, kie vi estos mia gasto. Do, ne hezitu!



Mi obeis al la grafo Bonfarulo, kaj mi enaŭtomobiliĝis. Okupante lokon la aŭto senbrue ekiris kaj ni preskaŭ flugante traveturis la tutan insulon. Dumvoje mi admiris la pejzaĝon, kiu estis eksterordinare admirinda. Ĝi similis al neniu konata pejzaĝo.

La plej strangaj estis la loĝdomoj. Ili estis globformaj kaj el vitro. Malgraŭ la vitro la domoj ne estis travideblaj, nur tie, kie la domposedanto permesis. Poste mi eksciis ĝi estis direktita per komutilo. De la domanoj dependis kiu parto estu travidebla en la domo. Se iu deziris kaŝiĝi, tiam la vitro de la tuta domo malheliĝis kaj ĝi similis al la tradiciaj muroj. Aliflanke, kiuj estis en la konstruaĵo, tiuj vidis ĉion. Komence tio estis tre stranga por mi. Ĉiam mi timis, ke oni vidas mian intiman sferon kaj mi fariĝos tro ridinda en la okuloj de la insulanoj. Sed oni trankviligis min, mi ne devas timi. En la tuta domo ĉio okazos laŭ mia plaĉo.

La insulo estis sufiĉe granda. La vojaĝo daŭris proksimume duonhoron.

Mi alvenis kasteloforman konstruaĵon. Kompreneble ankaŭ tie ĉi superregis la vitroglobo. Kiam mi enpaŝis la ĝardenon, la muroj ekbrilis en mil koloroj. Tio estis pitoreska kaj nepriskribebla. Mi estis ravita kaj mi ne sciis, ĉu tio estas realo aŭ ĉion mi nur songas.

La grafo Bonfarulo rapidis por saluti min.

-Estu salutate en mia hejmo! –li diris ridetante al mi.

-Daŭrigota-

# Poezio

## ORIGINALA POEZIO DE PETRO PALIVODA II.,

### Silento

Literoj, vortoj, propozicioj,  
ĉeestas interpunkcio,  
vortordo perfekte korekta,  
espero kaj ĝojo-malĝojo –  
ĉio en sortimento.

En la silabinterplekto  
parolas ni per silento.



### Floroj

ili estas simple floroj  
kaj tiel malperfektaj  
ili ne scipovas ion fari  
nur donaci ĝojon  
ili bezonas milionojn da jaroj  
por trapasi ŝtupojn de evolucio  
penatingi pintojn de perfekteco  
trompi perfidi kaj murdi  
al si similajn  
do iĝi homoj



# Poezio

## Evoluo

senhejma hundo  
feliĉon havis  
sed duone  
ĝi trovis sur balaaĵejo  
peceton da kolbaso  
sed tuj ricevis ĝia dorso  
senprokraste  
celtrafan frapon  
per bastono  
de vagabondohomo  
konkuranta  
ĝi devas ja memori  
ke homo estas  
krono de l' Naturo



## Revo

Mi revis,  
kiam estis infano,  
suprenflugi en la ĉielon,  
almenaŭ per aeroplano  
(aeroplano sin levas supren –  
kaj ĉiuj ne povantaj flugi:  
domoj, arboj kaj fostoj kaj tiel plu –  
iĝas tiom malgrandaj).

Aeroplano sin levas supren –  
kaj ĉiuj ne povantaj flugi:  
domoj, arboj kaj fostoj kaj tiel plu  
kaj tiu, kiu ne revis,  
kiam estis infano,  
suprenflugi en la ĉielon,  
almenaŭ per aeroplano –  
iĝas tiom malgrandaj.



# Por infanoj

## La oropomo de la reĝidino

Kaj estis, kaj ne estis, trans Fabeloceano vivis reĝo, kiu havis belegan filinon Sunbrileto. Ŝi estis tiom belega, ke en la tuta mondo ne estis simila. Kiu ekvidis la reĝidino, tiu tuj enamiĝis al ŝi.

Sunbrileto havis oropomon. Ĝin ŝi ĉiam kunportis. Tage, nokte ĝi estis kun ŝi. La oropomon ŝi ricevis de sia avino kaj ĝi estis por ŝi tre kara.

En iu tago terura afero okazis. La oropomo malaperis. Vekiĝante la reĝidino ne trovis ĝin apud la lito, kien ŝi metis vespere antaŭ la enlitiĝo.

-Paĉjo mia – ŝi ekkriis, kiam la oropomo ne estis trovita.

-Kio okazis karulino? – demandis la reĝo.

La knabino detale rakontis ĉion al sia patro kaj amare esploris.

La patro de la belega reĝidino promesis al ŝi, ke la pomo estos trovita.

Li tuj anoncis en la tuta imperio, kiu trovos la oropomon, tiun li riĉe premios.

Venis amase la bravuloj por provi bonŝancon. Ili ĉie serĉis ĝin, sed la oropomo nenie estis trovita. Post longa serĉado ili seniluziĝante iris hejmen. Fine jam neniu restis kiu serĉis ĝin.

Kiam la reĝidino sciigis pri tio, ŝi ege malgajiĝis. Dum la tuta tago kaj nokto ŝi nur ploris.



Ŝia patro ne sciis, kion fari. Ankaŭ li malgajiĝis kaj eksidis antaŭ la pordegon de la fortikaĵo sur benkon kaj triste rigardis la malproksimajn montojn.

Malrapide pasis la tempo. El la fortikaĵo laŭte aŭdiĝis la senĉesa plorado de la reĝidino.

La reĝo endormiĝis sidante sur la benko kaj li subite aŭdis:

-Mia reĝa Mosto, kio estas tiu ĉi amara plorado en la fortikaĵo? Kio okazis? Mi vidas, ankaŭ vi estas tre malgaja. Ĉu la kato forŝtelis la lakton el la nutrajokamero?

La reĝo dormeme eklevis siajn dormemajn okulojn al la knabo.

-Hej, knabeto, ja kato estus forŝtelita la lakton. Ĉe ni estas tre granda problemo. La oropomo de mia

filino Sunbrileto malaperis kaj neniu scias, kie ĝi estas.

-Ĉu nur tio estas la kaŭzo de via tristeco? – ekridis la knabo. – Mi trovos por via filineto tiun oropomon. Se mi trovos ĝin, tiam mi petas, donu al mi la manon de Sunbrileto.



La reĝo akceptis la peton de la knabo. Li ne trokredis, ke ĝuste tiu ĉi knabo trovos la oropomon de la reĝidino. Li lasis, ke la nova kandidatato komencu serĉi ĝin.

Neniu sciis, ke li kien iris. La knabeto malaperis kaj longe forestis. Jam la reĝo pensis, ke ankaŭ li fiaskis kaj li ne kuraĝas reveni. Certe li iris hejmen, kiel la aliaj.

Li ĝuste volis eniri la fortikaĵon, kiam ekaperis la knabo portante la oropomon. La reĝo tre ekmiris kaj demandis scivole:

-Filo mia, kie vi trovis la oropomon?

-Mia reĝa Mosto, tion mi ne povas malkaŝi al vi, ĉar mi promesis al la ŝtelisto, ke mi silentos. Bonvolu ne koleri pro tio!

La reĝidino tre ĝojis, kiam ŝi ricevis la oropomon kaj ŝi diris:

-Paĉjo mia, premiu ĉi tiun knabon!

-Mi volonte farus tion – respondis la reĝo. – Sed la knabo deziras, ke vi estu lia edzino. Ĉu vi volas edziniĝi al li?

Verdire la reĝidino nur nun rigardis pli bone la knabon kaj ŝiaj okuloj ekbrilis, ĉar ŝi tuj enamiĝis al li. Fine ŝi elbuŝigis:

-Tre volonte.

Tion aŭdante la reĝo tuj anoncis la geedziĝon, kaj post tri semajnoj okazis la brila, neĉiutaga evento. Multaj gastoj estis invititaj el la tuta mondo.

Jam de tri tagoj de tri noktoj daŭris la geedza ceremonio, kiam iu serĉis la novbakitan edzon. Li rapidis al la pordo kaj li vidis, ke tie staris museto.

-Salut', amiko! – diris la museto – Espereble vi rekonas min. Ĉu ne?

La knabo tuj rekonis la museton. Ĝi ŝtelis la oropomon. La alveninta gasto daŭrigis:

-Se nun vi ne gastigos min, tiam mi denove forŝtelos la oropomon de via edzino kaj ŝi estos tre malĝoja.

Tion la knabo ne volis. Li tuj ordonis al la servistoj, ke donu tiom multe da manĝaĵoj, kiom la museto povos forporti por siaj familianoj. La servistoj faris grandegan pakaĵon, kaj la muso feliĉe hejmenportis ĝin. Ekde tio la reĝidino ne devis timi, ke la oropomo estos forŝtelita.

Ili ankoraŭ nun vivas gaje, se intertempe ili ne mortis. Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

-Onklo Adalberto-



# HUNGARA MARO

# HUNGARA MARO

